



Estrara Komunikado EKO 2017-26 sendita el Budapeŝto, la 28an de septembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alirokajoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

Svarmas studebloj

Ankaŭ ĉi-jare la Jagelona Universitato en Kraków, Pollando, deziras kontribui al plialtigado de la lingvokono de esperantistoj el ĉiuj landoj. Ĝi invitas al 5-monata kurso de Esperanto, gvidota de instruistino vive, en la reto. La kurso komenciĝos **en novembro 2017**. Ĉiu kurso estas nova, freŝa, kun aliaj materialoj kaj variaj scioj; ĝi estas malkovriga por esperantistoj. Ĝi koncentriĝas al la bezonoj de ĉiu partoprenanto kaj helpas disvolvi rivelitajn talentojn. Instruas Maria Majerczak. La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la internacia EAQUALS-kvalito de Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon. Limdato por aliĝi: 10 oktobro 2017 (aŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj). Informoj: goo.gl/x1S3AH (<https://goo.gl/x1S3AH>)

Se, studinte ĉiujn informojn en la indikita retpaĝo (la anonco), vi decidis ALIĜI, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail\(punkto\)com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail(punkto)com) (ni publikigas la adreson de la kursoj ĉiam en tia kontraŭ-spama formo).

=====

Svarmas studhelpiloj...- [TEKSTARO.COM](http://tekstaro.com) – nova versio

La retejo "www.tekstaro.com" estas granda kolekto de aŭtentaj Esperantaj tekstoj, en kiuj oni povas serĉi diversajn vortojn, esprimojn, gramatikajn erojn por kontroli ilian realan uzadon en Esperanto, kaj por fari diversajn analizojn pri la reala lingvo-uzado. -

La Tekstaro 3.1 provizas uzantojn per pluraj plibonigoj. Al tiu unika korpuso de skriba Esperanto ĵus aldoniĝis gravaj pliaj verkoj de Zamenhof el pluraj periodoj. Modernigo de la interfaceto nun permesas la samtempan serĉadon laŭ pluraj serĉesprimoj. Tio donas novajn eblojn por eltrovi, kompari, kaj kontrastigi detalojn pri la uzado de Esperanto. Ĉio funkcias pli rapide, kaj la manieroj konstrui kompleksajn serĉesprimojn nun estas pli klaraj.

Informis: [ret-info/LS](mailto:ret-info@ls)

Svarmas surlokaj aranĝoj - Greziljono invitas:

27a de okt. ĝis 4a de nov.: **AŬTUNE la ferioj**

- honora gasto: *Stano Marček* el Slovakio
- kursoj: Aŭdo-vida kurso, Cseh-metodo, Tradukado de ŝercoj

- aktivaĵoj por infanoj kun *Elisabeth Barbay* kaj *Lucie Hulot*, preparo de halovena festo
- kantado, promenado, meditado, prelegoj, ludoj ...
- proponu viajn preferatajn aktivaĵojn!
- detaloj: <http://gresillon.org/a>

27a ĝis 31a de okt.: **Korusa renkonto** de *Interkant'*

- korsestro : *Zdravka Lenepveu*,
- detaloj: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique36&lang=eo#A1>

Maison Culturelle de l'Espéranto / E-Kulturdomo, Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 BAUGÉ-EN-ANJOU, Francio

Svarmas bravaj iniciatoj...

La 2-a numero de Unesko-Kuriero en Esperanto

La 2-a numero (julio-septembro) de *Unesko-Kuriero* estas preta. La reta versio estas senpage elŝutebla ĉe http://www.uea.org/revuoj/unesko_kuriero

Nuntempe ni rajtas esperantigi la Unesko-Kurieron el 7 lingvaj versioj: la angla, araba, franca, ĉina, hispana, portugala kaj rusa. Atentu, la portugala lingvo ne estas oficiala lingvo de UN kaj Unesko! Unesko akceptis la portugalan lingvon kiel la kurieran lingvon kaj ĝian retpaĝan lingvon. Tio signifas ke Esperanto apogata de Unesko havas grandan esperon. Tio estas ĝuste nia celo por eldoni Unesko-Kurieron en Esperanto!



Ĝis nun, niaj volontulaj tradukistoj ĉefe venis el la regantoj de la angla kaj franca lingvoj, kaj tre malmulte de la ĉina. Neniu venis el la araba, hispana, portugala kaj rusa lingvoj. Ĉu Unesko povas akcepti nian lingvon kiel la Kurieran lingvon kaj ĝian retpaĝan lingvon, tio dependas de regula eldono, kvalito kaj vasta partopreno de diversaj nacioj kiuj parolas Esperanton. Mi petas ke la parolantoj ankaŭ de la araba, hispana, portugala kaj rusa lingvoj aliĝu al la teamo. Novaj altnivelaj tradukistoj kaj provlegantoj ĉiam estas bonvenaj. Tro da traduka tasko povas lacigi la nunajn senpagajn tradukistojn.

Bv. aliĝi al la teamo de Unesko-Kuriero en Esperanto sendante mesaĝon al la kunordiganto kaj redaktoro Trezoro Huang Yinbao <trezoro@qq.com>

La unua numero de la Kuriero en Esperanto.

Svarmas legendaj paĝoj: - Luktu plenumi vian celon!

Esperanto-sumoo konsistas el partoprenantoj, kiuj legas librojn, ĉiun tagon, pli ol mem promesitan kvanton da paĝoj, kun 350 homoj en la mondo. Baldaŭ komenciĝos la 49a Internacia Esperanto-Sumoo, kiu daŭros 15 tagojn. Mi atendas vian aliĝon; sendu al mi jenajn informojn: Nomo, sekso, luktista nomo (pseŭdonimo), urbo, lando, retadreso, titolo de legota libro kaj kvanto da paĝoj por unu tago. Por pli da informoj vizitu niajn retejon, Vikipedian kaj Fejsbukan paĝojn:



<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>
https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

HORI Jasuo (s-ro), JP-371-0825
Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone
2-13-3;
horizonto@water.sannet.ne.jp

Vortoj: 655

=====00000=====



Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.